

NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JUNIO 2004

“ESPERANTO EN LA MOCHILA”

Post la sukcesa eldono de la kataluna ĵus aperis en la hispana la libro “Con el esperanto en la mochila”, kiu rakontas mondvojaĝon laŭ la romano de Julio Verne. Malkiel la du personoj de la franca verkisto, ili elektis vojaĝi ĉefe ne mare, sed tere, laŭ la Silka Vojo, kaj trairis Turkion, Iranon, Turkmenion, Uzbekion, Kazakion kaj Ĉinion; poste ili enŝipi is al Japanio por transnavigi de tie la Pacan oceanon, tratrajni Usonon kaj reen ipi i en Nov-Jorko cele al la elirurbo, Londono. La voja o okazis kun granda tempopremo, tamen la mondvojaĝantoj renkontis afablajn esperantistojn ĉie en siaj haltoj, kio permesis al ili ui multajn vidinda ojn kaj glatigis la vojaĝajn incidentojn.

La libro estas atentokapte verkita kaj humurplena. La aŭtoroj kombinas taglibran rakonton kun parentezoj jen enciklopediaj jen analizaj. Esperanto aperas en la libro tre nature: en la komenco oni iom klarigas pri ĝi kaj mencias la esperantistecon de Verne. Poste, laŭlonge de la libro, oni de tempo al tempo nomas ĝin, sed klaras, ke la du aventuremaj vojaĝantoj uzadas ĝin por interkompreniĝi ie. Hispana Esperanto-Federacio havas kelkajn elzemplerojn kiujn ĝi vendas rekte en sia sidejo po 17 eŭroj.

BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Madrida Esperanto-Liceo jam havas la oficialan leteron kun la permeso de la aŭtoroj kaj de la franca eldonejo L’Harmattan por eldoni en la hispana la verkon de Canetti kaj Masson “La homo kiu defiis Babelon”, biografio de L.L. Zamenhof.

INTERRETE

Ĉe la retpaĝoj www.edukado.net/es_lernejoj.jsp troviĝas listo de E-kursoj je ĉiuj niveloj en la tuta mondo.

Informoj pri naciaj/regionaj lingvoj kaj internaciaj komunikadoj pere de komuna lingvo vi povas trovi ĉe: www.2-2.se

KURIOZA ERARO

En la marta Eŭropa Bulteno aperas jena eraro rilate la EEU-kongreson en Bilbao: “... ekskursoj boate ĝis Portugalio...” kompreneble ne temas pri la lando Portugalio kiu troviĝas je 800 km for de Bilbao, sed de la vilaĝo Portugalete tre proksima al Bilbao.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), je aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 aŭ kontakti rete admin@esperanto-es.net

La lastan 15-an de majo okazis en la sidejo de HEF Eksterordinara Ĝenerala Asembleo kie, inter aliaj aferoj, oni aprobis la ŝanĝon de statutoj por adaptiĝi al la nova "Ley de Asociaciones" (L1/2002). La Estraro anoncis ke neniu el siaj anoj deziras prezentiĝi kiel kandidato dum la venonta Asembleo de Bilbao kie oni devas elekti, laŭ la statutoj, novan Estraron.

NOVA LIBRO DUM HEF-KONGRESO

"ESPERANTO: LENGUA Y CULTURA", hispanlingve verkita de Antonio Valén. Madrida Esperanto-Liceo, por profiti antaŭ-eldonan rabaton por grupoj (8 eŭroj, inkludas sendokoston), faros komunan mendon. Antaŭ-pago necesa al la

konto de Madrida Esperanto-Liceo *

ĉe Banco Atlántico 0008/0110/97/1120/404200

Vi devas preni vian ekzempleron ĉe HEF, en Rodríguez San Pedro 13.

* Lasta tago por akcepto de antaŭmendo estas la 20a de junio

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

DUM JUNIO ANKAŬ niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

7-an de junio. Projekcio de lumbildoj. “Ĉu vi vere konas Madridon?”

19-20an junio, **tuttage sabaton kaj dimanĉon**, Fundación Esperanto partoprenos en “El Maratón de Cuentos” de GUADALAJARA pere de budo kiu montros esperantajn librojn kaj diversajn e-materialojn. Al Guadalajara oni povas iri facile per trajno. La Foiro, speciale por infanoj, okazos en la enirejo de la belega renesanca “Palacio del Infantado”.

22-an de junio, **marde vespere**, ekskurso al SEGOVIO por viziti la Alkazon.

Ekde la 16-a de junio kaj julio, **merkredo** (senpage) je unuaj horoj de la vespero (antaŭ la 17,00) oni vizitos diversajn monumentojn de “Patrimonio Nacional” (Palacoj de Aranjuez, El Pardo ktp. Monaĥejoj de Las Descalzas kaj La Encarnación) Por informoj kaj detala programo telefonu vespere la antaŭan lundon al 91 445 80 79.

ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

La aprila numero (Nº 11) de la hispana magazino XPLORA publikigas legindan sespaĝan artikolon kun tre interesa kaj varia informo pri Esperanto, kun allogaj fotoj. Sur la kovrilo kaj en la malsupra parto, oni povas legi: Esperanto, el idioma más universal (Esperanto, la plej universala lingvo). La kerno de la artikolo ajnas esti intervjuo kun Ana Manero. Oni aperigas ankaŭ mallongajn informojn por detruigi la ĉiamajn diraĵojn pri esperanto, ekz. utilas por nenio, neniu parolas ĝin, la angla estas pli bona lingvo...

La senpaga madrida ĵurnalo “20 minutos” (2004-05-26) en la studenta suplemento publikigis anoncon pri la ret-paĝo de HEF.

PREMIO ADA SIKORSKA

La kandidateco de Augusto Casquero proponita por Madrida Esperanto Liceo al la Premio Ada Sikorska havas apogon de la E-Societo de Tenerife kaj de la Hispana Esperanto-Federacio.

Madrida Esperanto Liceo petas al ĈIUJ E-GRUPOJ kiuj deziras apogi la kandidatecon de A. Casquero ke ili sendu leteron al du jenaj adresoj:

Komisiono pri la Premio Ada Sikorska. Prezidanto: G.C. Fighiera.

Fax + (39) 011 226 30 78

Komitatano: Luis Serrano luis_serrano@mixmail.com

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid